

# Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

**N-ro 3 2016    Vendredon la 2an de septembro    64a jaro**

---

## Kalendaro

Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30**.

**Mardo la 6a de septembro** (sem. 36) – *tirsdag*

La Universala Kongreso en Nitro. *Verdenskongressen i Nitra. Medlemmer rapportas.*

**Vendredo la 16a de septembro** (sem. 37) – *FREDAG*

Kromkunveno. Martin Strid multe okupiĝas pri sveda popolmuziko kaj -dancoj. Lastatempe li esperantigis feroajn baladojn kaj verkis proprajn pri la E-movado. Li venos al Oslo kaj ofertas al ni prelegon kiun li preparis por Ar/Kon/Es en Poznań. *Ekstramøte. Martin Strid driver med svensk folkemusikk og -dans. I det siste har han oversatt færøyske ballader og laget egne, med temaer fra esperantos historie. Han tilbyr oss et foredrag som han har forberedt for en kulturfestival i Polen.*

**Lundo la 19a de septembro** (sem. 38) – *mandag*

Kiel prezenti Esperanton al nesciantoj? *Hvordan legge ut om esperanto for de uvitende?*

**Mardo la 4a de oktobro** (semajno 40) – *tirsdag*

Malnovaj norvegaj metioj. Traduk-ekzerco (daŭrigo). *Tradisjonelle norske håndverk. Oversettelsesøvelse (fortsettelse).*

**Lundo la 17a de oktobro** (semajno 42) – *mandag*

Kiel verki kaj sendi gazetartikolojn pri Esperanto? *Hvordan skrive og sende artikler om esperanto til avisene?*

**Lundo la 30a de oktobro kaj mardo la 1a de novembro** (sem. 44) – *(libera elekto /fritt valg)*

Ni invitos la partoprenantojn de la interretaj kursoj ĉe lernu.net veni renkonti nin kaj informiĝi pri la diversaj ebloj uzi la lingvon. *Vi inviterer deltakerne på internett-kurset på lernu.net til å komme og bli kjent med oss og med mulighetene for å bruke esperanto.*

# OKAZIS

## **Mardon la 5an de aprilo**

Studkunveno. Okaze de la norvega "Jaro de la Kulturmemoraĵoj" 2009 Otto Prytz skribis norveglingvan artikolon pri siaj infanaĝaj spertoj pri multaj aparatoj kun kranko. Ni diskutis la defiojn kiujn prezentas Esperanta traduko: pro specialaj terminoj, pro la ĉiutaga lingvaĵo kaj pro la neceso adapti lokajn aludojn al la (ne)scioj de internacia legantaro. Esplorante en la grandaj vortaroj ni ĉiuj lernis novajn vortojn kaj plilertiĝis pri tradukado al E-o.

## **Lundon la 18an de aprilo**

Ni aŭdis pri la historio de la fervojo ĉe Grefsen kaj diskutis pri la motivoj por konstruado de etaĝdomoj apud stacio – ĉu por havigi loĝejojn por kreskanta loĝantaro aŭ profiton al komercistoj? Junaj familioj volas loĝi en vilao kun ĝardeno, sed ĝardenon eblas havi ankaŭ urbo-meze surtegmente de etaĝdomo.

## **Mardon la 3an de majo**

Subteno al filipinaj familioj: Snorre Benum rakontis kiel okazis ke li pagis por edukado de kvar virinoj, kaj Cato Haugen montris per sia portebla komputilo bildojn de nova domo konstruata per lia monhelpo. Tia persona helpagado en malriĉa lando eblas pro niaj altaj norvegaj salajroj kaj pensioj. Kaj tia rekta helpo videble atingas la helpatojn, dum mono perata de loka organizo povas malpliigi pro la tiea korupto

– ĉiuj volas akapari sian parton. Tamen malgraŭ la multa korupto bone funkcias pluraj norvegaj help-projektoj tiulande.

## **Mardon la 7an de junio**

“Malnovaj metioj”. Ni daŭrigis la tradukekzercon, revizianta la malneton kiun preparis Kjell Peder de la unuaj du ĉapitroj de la muzea kajero.

## **Lundon la 20an de junio**

Ni diskutis la planon de UEA aĉeti duan domon en Roterdamo, kiel loĝejon por volontuloj k.s. en la Centra Oficejo. Ŝajnas ke UEA jam havas sufiĉan kapitalon por aĉeti, sen devi fari kolekton. Alternativo ŝajne ne menciita en la jama diskuto ĉe *Libera Foiro* estas vendi la nunan domon en Roterdamo kaj kolekti monon por plikosta domo en Bruselo, la “ĉefurbo” de EU.

## **Lundon la 11an de julio**

Okaze de vizito de gastoj el Japanio, Akira kaj Masajo Saiki, ni aranĝis kromkunvenon. Ni agrable interparolis, i.a. pri kaŝ-armigo kaj laborkondiĉoj en Japanio kaj longe pri skribsistemoj de la japana kaj aliaj aziaj lingvoj. La gastoj donacis tri librojn (kajerojn), inter ili 170-paĝan fotaron faritan de Hori Jasuo pri la katastrofo en Fukuŝima (2011) kun priaj poemoj en la japana kaj E-a traduko.

# Informbudo en la Mela-festivalo

Ankaŭ ĉi-jare ni starigis informbudon en la *Iqra*-tendo de la Mela-festivalo sur la urbodoma placo, kaj deĵoris tie tri tagojn (vendredo 19<sup>a</sup> – dimanĉo 21<sup>a</sup> aŭgusto).

Venis al la budo multaj homoj – precipe junuloj kaj enmigrintoj – kiuj neniam aŭdis pri Esperanto. Ni donis al ili slipon kun bazaj informoj. Pli aĝaj norvegoj iam aŭdis pri Esperanto, sed ne leginte novaĵojn pri ĝi lastatempe, supozis ke ĝi mortis. Ni certigis al ili ke ni uzadas ĝin ĉiun tagon kaj ke en la lastaj jaroj kreskis la interesiĝo en foraj mondopartoj (Brazilo, Orienta Azio, kelkaj afrikaj landoj, kiel Togolando kaj Burundo). Kaj kelkaj malmultaj vizitantoj ĉe nia budo esprimis pozitivan intereson, eĉ entuziasmon. Ni rekomendis al ili pri la senpagajn interretajn kursojn ĉe [lernu.net](http://lernu.net) kaj [duolingo.com](http://duolingo.com).

Iuj demandis kiom da norvegoj parolas Esperanton. Ni respondis ke ni nun havas ĉ 150 membrojn, sed ke ankaŭ aliaj lernis la lingvon. Kaj konfirme pri tio, dum nia deĵoro venis du junaj eksmembroj, kiuj rakontis – en bona Esperanto – ke ili ankoraŭ praktikas la lingvon, vojaĝe kaj gastige.

Kiaj **ne** venis, estis skeptikuloj kaj kverulantoj. Tiajn ni renkontis tie antaŭ kelkaj jaroj, sed nun ne plu. – DD

## Someraj gastoj

Antaŭe venis eksterlandaj gastoj al nia klubejo precipe en la somero. Nun ili povas aperi ankaŭ en novembro aŭ februaro, aviadile nur por semajnfino en Norvegio.

Tamen ĉi-somere venis kelkaj: la geĵapanoj kun kiuj ni aranĝis kromkunvenon en julio; juna moskvanino, kiu venis senaverte kaj restis nur dek minutojn por aĉeti librojn kaj skribi en nia gastlibro; kaj polo el Krakovo kiu havis kiel projekton surgrimpri la plej altan monton en ĉiu lando de Eŭropo: Do survoje al ni li staris sur Kebnekaise, la plej alta monto en Svedio (2111 m) – kaj ankaŭ en la tuta norda Skandinavio – kaj Galdhøpiggen. Pluvojaĝonte hejmen li lasis al ni sian lastan manĝoprovizon, plurajn kg, kiujn li jam portis dorsosake sur tiuj (kaj kelkaj aliaj) montoj.

Laste venis ankaŭ konatoj Lennart Svensson, la mastrumanto de la gastigejo/ kursejo en Lesjöfors en Värmland, survoje hejmen de Grésillon, kaj de Tromsø la prezidanto de NEL, Mario Machlik. – DD

## Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj k.s. donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto – kiel ekzemple en la Mela-festivalo (vidu la antaŭan paĝon). Ofte jun(et)uloj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

**Viktig:** *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

---

## Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Nia kunveno estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de pli granda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

*Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.*

---

## Kromekzempleroj

En la klubejo ni havas grandan kolekton da **kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj**: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

---

**Vizitkartoj** Ankoraŭ restas vizitkartoj kun la adresoj i.a. de la senpagaj E-retkursoj lernu.net kaj (la angla) duolingo.com.

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18\*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94  
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 6 al Sinsen.  
Vd. pli detale interrete ĉe [esperanto.no/oslo](http://esperanto.no/oslo) => "vojklarigo".

\* inng. Schouterrassen. [www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo) Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)  
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

